

DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

Redakcio kaj administracio:
Praha XIX., Uralské nám. 447.
Telefona n-ro 718-41.

Redaktas:
Dr. ST. KAMARYT
Dr. A. PITLÍK

Senpage por membroj de
Ĉs. Asocio Esperantista.
Aperas sesfoje dum la jaro.

UNUECIGO ORGANIZA, INTERNACIA KAJ ENLANDA.

En Genève dum paska kunveno de la provizora Estraro de nova UEA kaj en Wien dum la kunveno de UEA-komitatoj kaj ĉefdelegitoj dum la pentekosta konferenco mi havis okazon vidi, kiamaniere naskiĝas nova formo de nia internacia organizo. Ĝi ne estas facila tasko, kiun la esperantistoj donis al si. Sed ĝi estas celo, kiu estas nepre atinginda. Ĉar multaj simptomoj sugestas, ke nova periodo de nia movado estas venanta. Amika rondaro, kia fariĝis nia movado ĝis nun, atingis tian gradon de perfekteco kaj stabileco, ke ekzisto de tia movado por pluraj jarcentoj estas garantiata. Oni ĉiam trovos personojn, al kiuj imponos facila akirebleco de senperaj internaciaj individuaj rilatoj kun iom da sentimentala prediko pri tutmonda frateco.

Sed ĝuste tia movado ne estis kaj ne povas resti nia idealo. Ĉar nia fina celo kaj nia malfacila sed efektivebla tasko estas, ke esperanto fariĝu ilo ne privata, sed oficiala. Tio signifas bezonon de propagando internacie organizata disponiganta kun taŭgaj rimedoj. Krei por tio ilon, tio estas celo de kunigo de la estinta UEA kaj estinta ICK en novan efektive universalan UEA. Ĝi kreiĝas, malfacile kreiĝas, sed estos kreita.

Logika konsekvenco de tia unuecigo internacia estas ankaŭ organiza unuecigo en unuopaj landoj. En nia lando ĝi ankaŭ estas kreata. La porstatuta komisiono, kiun eniris po 3 komitatoj de ĈAE kaj GEL kaj prezidantoj de ARE kaj REL, havas jam esperantlingvan tekston de la statuto, kiu enhavas diversajn aldonojn kaj korektojn, kiuj rezultis el diskutoj kaj korespondadoj. Ankaŭ projekto de Sekcia regularo estis sendita al ĉiuj ĝiaj anoj. La komisiono ne povis konservi precize la terminon donitan al ĝi de la koncerna kunveno. Ni ĉiuj, mi pensas ke prave, estis konvinkitaj, ke estas preferinde fundamenta pripensado anstataŭ troa rapideco. Sed same mi pensas, ke ĉia senutila prokrasto estus kulpo kontraŭ devoj organizaj.

La nova asocio transprenos la aferojn de la ambaŭ naciaj centroj. Tial la anoj eĉ ne spertos ŝanĝon krom ankoraŭ pli intensa aktiveco propaganda, ĉar simpligo de administrado liberigos fortojn de ni pluraj por pure propaganda laboro. Tial ni petas ĉiujn niajn membrojn, ke ili ĉiuj daŭrigu siajn poresperantajn laborojn, ke ili ne haltu, ke ili ankaŭ tiun jaron pagu siajn kotizojn en decaj kaj taŭgaj terminoj. Precipe ili ne forgesu, ke same tiun ĉi jaron kiel en jaroj antaŭaj posedo de Jarlibro kaj de abono de la revuo „Esperanto“ estas tre taŭgaj iloj por ilia laboro. La Jarlibro 1934 jam aperis.

Stan. Kamaryt.

SALUTON AL SKOLTOJ—ESPERANTISTOJ!

Dum 16—31-a de julio 1934 vivis en tendaro en Kordíky apud Banská Bystrica laŭ skoltaj maniero kaj principoj anoj de Skolta ligo esperantista, kiuj venis el rimarkinde granda nombro de landoj, sekvinte inviton de la organizanto „Esperanto-fako de Centro de slovakaj katolikaj skoltoj“ en Bratislava.

Ili akceptu de ni sinceran saluton kaj esprimon de nia plej varma deziro, ke ili alportu el nia patrujo la plej bonajn rememorojn en siajn landojn!

*Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista.
Kamaryt, prez., Ginz, ĝen. sekr.*

Per Esperanto fra Rumanujo.

En majo 1934 vizitis karavano da 135 ĉsl. fervojistoj sub la gvidado de fervoja konsilisto H. Friedrich, komitatano de ĈAE, el Košice, Rumanujon. Pro lingvaj malfacilaĵoj kaj pro manko de aliaj informoj petis la gvidanto helpon de la rumanaj esperantistoj. Dank' al ili, precipe dank' al multaj klopodoj de ĉefdél. de UEA en Bukureŝto, s-ano H. Harabaĝiu, havis la aranĝoj la plej bonan sukceson kaj la karavano fariĝis granda manifestacio por esperanta. La rumanaj esperantistoj helpis starigi la publikon per gazetoj kaj per radio pri nia vizito, ili preparis ĉiun detalon de nia akcepto, zorgis pri ni dum nia restado; iliaj oferemo kaj lerteco mirigis la partoprenantojn kaj la facila interkompreno inter la ĉsl. kaj rumanaj esperantistoj instigis multajn partoprenintojn, ke ili jam nun lernas esperanton.

Komencinte de la limstacio Halmei estis nia karavano akceptita en la pli grandaj stacioj (Oradea, Cluj) per la militista aŭ per la fervojista muzikoj, per — plej olte francaj — alparoloj, kiujn respondis la gvidanto en esperanto. La stacidomoj estis solene ornamitaj per naciaj flagoj de ambaŭ nacioj, amaso da publiko atendis nin ĉie kaj la vigleco kaj bonhumoro de la rumanaj amikoj montriĝis per la nacia „hora“, kiun oni dancis sur la peronoj. Al la danco baldaŭ aliĝis niaj ĉeĥoslovakoj.

En Sinaia atendis nin krom la militista muziko jam deputacio de la bukureŝtaj samideanoj kaj de la bukureŝtaj fervojistoj, kiuj akompanis nin poste ĝis Bukureŝto. Sed la ĉefa surprizo atendis nin en Konstanca kaj en Bukureŝto. Ĉi tie la samideanoj bonege klopodis ne nur pri la programo, sed ili prizorgis al ni ankaŭ la hotelojn, manĝaĵojn kaj ĉiujn ceterajn bezonaĵojn kun tia sperto kaj tiel malkare, ke oni povus tion postuli de neniu vojaĝoficejo. Ili akompanis nin senlace tra siaj urboj por montri al ni ĉion interesan kaj ili fariĝis dum tiuj kelkaj tagoj niaj veraj amikoj.

Ĉar la karavano havis duonoficialan karakteron kaj ĉar la gvidinto uzis por la oficialaj alparoloj sole esperanton (ankaŭ antaŭ la ĝenerala direktoro de la rumanaj fervojoj Inĝ. C. Mereuca kaj antaŭ la ĉsl. ministro en Bukureŝto s-ro Šeba), oni bone akcentis la aplikeblecon de esperanto por la praktika interkompreno inter ambaŭ amikaj nacioj. La bonan rezulton oni vidas jam nun en diversaj raportoj, kiujn skribis la partoprenintoj precipe en la fakajn gazetojn. Ankaŭ la direkto de ŝtataj fervojoj en Košice informis en tiu senco ĉsl. ministerion de fervojoj.

Krom s-ano H. Harabaĝiu meritas specialan dankon de ĉiuj karavananoj prezid. de la Rum. Esp. Societo H. Fischer, f-ino Alías kaj s-anoj Oraviceanu, Jonescu-Capatzana kaj Schechter en Bukureŝto,

f-ino E. Morariu en Cluj kaj s-ano D. Minceff en Konstanca; la afablecon de tiuj ĉi geamikoj longe memoros ĉiuj ekskursintoj. De nia flanko helpis al la gvidinto s-anoj Pech el Plzeň, Parkman kaj Čermák el Košice.

Se vi volas agrable kaj malkare vojaĝi eksterlanden kaj se vi volas vin senti kiel hejme, uzu esperanton!
J. Friedrich.

La oficista grupo en Košice de Unia Železničných zamestnancov v ČSR, aranĝinta la ekskurson, sendis al ĈAE donacon de 200 Kč kun bela letero. Sinceran dankon!

La fervoja direkto en Košice akcentis en sia raporto al la ministerio (21. VI. 1934, n-ro 20692-II-34) la gravajn servojn, faritajn de esperantistoj al la ekskurso.

Komitataj kunvenoj de ĈAE.

La II. komitata kunveno de ĈAE okazis 10an de julio en Praha. Ĉeestis s-roj: Dr. Pitlík, prof. Kožený, Ginz, Šustr, Staněk F., Staněk M. Prezidis: Dr. Pitlík. El la protokolo: **Unuecigo.** Ĉeĥaj membroj de statuta komisiono kompletigis la statutaron laŭ esprimitaj deziroj de la ĝenerala kunveno kaj de reprezentantoj de GEL en ĝenerala kunveno ĉeestintaj. Speciale estis nove verkita regularo por la naciaj sekcioj. Dr. Kamaryt informas skribe pri enhavo de lasta cirkulero de UEA, kie estis sciigo, ke ambaŭ niaj landaj asocioj estis akceptitaj al UEA. Estis decidite sendi al estraro de UEA energian proteston, ĉar nek Dr. Kamaryt, nek la komitato de ĈAE subskribis konsentan proklamon pri aparta membreco de ambaŭ asocioj en UEA. La raporto en cirkulero ne esprimas la veron, kvazaŭ komitatoj de niaj landaj asocioj konsentus pri aparta membreco en UEA, ĉar neniu en nomo de ĈAE faris tian decidon. La komitato komisiis Dron Kamaryt transdoni tiurilate proteston al UEA. La komitato aprobas proponon de Dro Kamaryt, ke la porstatuta komisiono kunvenu antaŭ Stockholma kongreso kaj komisiis s-ron Fridrich kunvoki la kunvenon kaj fiksi la daton kaj lokon. La raporton pri unuecigo kaj resumon prezentis Dro Pitlík. — **Delegito de ĈAE ĉe Stockholma kongreso.** Dro Kamaryt sciigas, ke li ne povas veturi al kongreso. La estraro petas s-ron Friedrich, ke li akceptu delegitan funkcion kontraŭ ankoraŭ fikso mona kompenso. En okazo, se s-ro Friedrich ne povus veturi, la komitato petas prof. Kožený aŭ dron Pitlík reprezenti ĈAE dum la kongreso, kie oni interalie pritraktos la unuecigan problemon en ČSR. — **Viena konferenco.** Dro Pitlík raportas pri rezultoj de la konferenco, sukcesa aranĝo laŭ ekstera flanko, sed ne ĉiam kontentiga laŭ enhave. — **Esperanta Enciklopedio** jam aperis kun artikoloj pri ĈAE

GEL kaj ĉeĥoslovakaj landoj, verkitaĵoj de Dro Kamaryt. — Ĉeĥoslovaka antologio. Dro Kamaryt urĝas rapidigon de laboroj por la antologio. Estis akceptita la rezigno de s-ro Hromada kiel ĉefredaktoro de Antologio. Komitato petas membrojn de la antologia sekcio daŭrigi la laboron kaj s-ron Ginz transpreni la materialon. — Ligilo. Komitato esprimas bedaŭron pri publikigo de la ĉefartikoloj en n-roj 5a kaj 6a, kiuj povus per sia neinformiteco kaj politika malneutraleco malutili la bonajn penojn de ĈAE-komitato por unuecigo en ĈSR kaj subfosi la esperantistan harmonion en nia lando. — Libroservo de ĈAE decidis zorgadi al niaj membroj esperantan literaturon kaj por tiu celo estis fondita nova konto ĉe poŝtparko. Tiu ĉi perado fakon gvidos s-roj Slavfk kaj Ginz. — Skriba kurso. S-ro Ginz proponas aranĝi skriban kurson de esperanto. Estis akceptita la propono la skriban kurson eldoni kaj trakti pri ĝia verkigo.

Kroniko esperantista en ĈSR.

Internacia konferenco „Esperanto en la praktiko kaj en lernejoj“ en Vien 1934 dum pentekosto bone sukcesis. Detala raporto estis en „Esperanto“. Tie ĉi estu sole dirite, ke partopreno el nia lando estis tre deca, dank' al nia persista klopodado. La oficialaj kaj duonoficialaj aŭtoritatoj ricevis el Vien per diplomaciaj lokoj invitilojn en ĉeĥa lingvo. (La traduko estis de ni farita.) Ĉar pro la nuntempa ekonomia situacio estas ĉe ĉiuj oficoj tre malgranda emo por tiaspecaj partoprenoj, ni turnis nin per specialaj leteroj al 42 zorge elektitaj lokoj, atentigante pri graveco de la konferenco. La teksto de la letero estis verkita de dro Pitlík. Rezultis korespondado kaj bezono de personaj intervenoj. Tiu fakto mem havas sendube gravan valoron propagandan, eĉ se la koncernaj korporacioj ne sendis oficialan reprezentanton. Oficiale reprezentigis sin nia Fervoja ministerio, kiu delegis min. konsiliston J. Hondl, kaj Radio-journal en Brno, kiu delegis prof. T. Kilián. Ambaŭ oficialaj delegitoj vigle partoprenis agadon de la konferenco. ĈAE kaj GEL estis reprezentitaj de siaj prezidantoj Kamaryt kaj Scholze. Scholze estis elektita prezidanto de la laborkunvenoj de la konferenco. La ambaŭ funkcioj uzis ĉeeston de gvidantoj de UEA por klarigi al ili liajn vidmanierojn pri la organizaj problemoj internaciaj kaj enlandaj. — Detala protokolaro de la konferenco estas redaktata kaj baldaŭ aperos. Ĝi estos nepre bezona dokumento por ĉiu aktivulo. Antaŭmendojn akceptas jam nun nia sekretario. Unu ekz. koston 5 Kč. Ĉe mendo de almenaŭ 10 ekz. rabato da 20%.

Per poŝtmarko kaj Esperanto ekkonu la mondon! La grava eldonejo Česká grafická Unie eldonis sub tiu ĉi devizo falditan presaĵon tre bone tipografie aranĝitan kun ĉeĥa-esperanta teksto. Ĝi estas verkita de B. Milič kaj J. Šamla kaj destinita por studentoj de burĝaj kaj ceteraj duagradaj lernejoj. La kvazaŭ-prospekto rekomendas al la studento glui sur la folion uzitajn ĉeĥoslovakajn poŝtmarkojn kaj adresi ĝin al iu adreso donita en la apuda teksto. La adresoj estas de zorge elektitaj junular-amikoj el 36 ŝtatoj. La adresato promesis transdoni la ricevitan folion al iu el la studentoj, kun kiuj li kontaktas. Tiu ricevinto plenigas la rubrikojn presitajn sur fortranĉebla parto de la folio algluante la sialandajn poŝtmarkojn kaj plenigas ankaŭ diversajn rubrikojn postulantajn informojn pri lia lando kaj resendas ĝin al la sendinto. La teksto enhavas ankaŭ mapon de nia respubliko kaj lokon por bildo de la ŝtato de la respondinto. La presaĵo estos taŭga helpilo en geografia instruado kaj lernado. Ĝi tre meritas esti rekomendata kaj disvastigata. Ĝi koston 1.50 Kč.

Fotochema, fabriko de fotografiaj iloj en Hradec Králové, aperigis esperantlingvan prospekton pri siaj plakoj, filmoj kaj paperoj konataj sub la marko F o m a. Ni rekomendas diskonigon de la fakto kaj uzon de la reklamataj foto-iloj. La prospektoj estis disdonataj en la Wiener konferenco.

Internacia konkurso pri Jezueto de Praha. Ligo de katolikaj esp-istoj en Ĉeĥoslovakio organizis tiun ĉi jaron konkurson inter esperantistoj por ricevi respondojn je demando „Kian estimon havas en fremdlando la gracoplena Jezueto de Praha.“ Venis 16 verketoj el 12 landoj (Aŭstrio, Francujo, Belgujo, Nederlando, Hispanujo, Germanujo, Svisujo, Pollando, Katalunujo, Rumanujo, Trinidado, Suda Hindujo). Premiitaj estis inter ili kvin: Unuan premion (300 Kč donacitajn de episkopo Dr. Ant. Eltschkner) ricevis P. Henry Joseph C. D. Ayroor el Malabar. Duan (200 Kč donacitajn de Bohemia landestrarano Fr. Zelinka) ricevis P. Marti Albanell el Barcelona. Trian (100 Kč donacitajn de L. Dandová) P. Dom Wilfrid Broens el Trinidad. Kvaran (100 Kč donacitajn de L. Penzová) D. Robert el Bruxelles. Kvinan (100 Kč donacitajn de Fr. Bühr) ricevis P. Piotr Pieta el Kraczkov en Polujo. — Ĉiuj partoprenintoj de la konkurso ricevis de la Ligo grandan bildon de la Jezueto de Praha kaj bildon de la Liga prezidanto, episkopo Eltschkner.

Germana Esperanto-Ligo en Ĉsl. publikigis en 2-a numero de sia bulteno „Informilo de GEL“ germanan tradukon de la origina statuto-projekto de la fondata tutŝtata asocio. En la 4-a numero ĝi publikigis la proponon de Regularo de sekcioj, verkitan de d-ro Kamaryt. Aperigo de tiuj tekstoj certe tre helpas, por ke la germanlingvaj samideanoj estu informitaj detale pri laboroj kon-

cernantaj londen de la diskutata tutŝtata asocio. Depost apero de tiuj tekstoj la laboroj de la „Porstatuta komisiono“ ĝojige antaŭen iris. La statuto-projekto estis laŭ diversaj proponoj kaj kritikoj kompletigita, pluraj gravaj paragrafoj nove redaktitaj, la Sekcio-regularo estis finverkita, la ambaŭ tekstoj tradukitaj esperanten, multobligitaj ciklostile kaj senditaj al komisionanoj por prijuĝo. Tiu laboro estis farita de sekretario de ĈAE. Ni esprimu tie ĉi atendon, ke ĉiuj komisionanoj klopodos fini sian studon de la statuto en tempo baldaŭa.

Kunveno de nordbohemiaj esperantistoj. La de k unua okazis en Teplice-Šanov la 6-an de majo. Oni diskutis pri unuecigo de „Esperanto“ kaj „Heroldo“. S-roj Krisl kaj prof. Murath rekomendis la unuecigon, s-ro dr. Pontz konfidi, ke funkciuloj de UEA taŭge solvos la aferon. Estis akceptita propono de dr. Pontz, ke ARE uzu kiel sian Inter rondilon la „Informilon“ de GEL.

Radio.

Radiojournal Brno nin informas:

La radiostacio de Brno ricevis post siaj esperantlingvaj paroladoj kaj precipe post siaj esperantlingvaj horetoj grandan aron da korespondaĵoj, en kiu la gesamideanoj laudas la programojn, kritikis ilin, eldiras siajn dezirojn, informas nin pri diversaj ktp. Ni dankas ilin sincere. Ĝis la fino de la jaro 1933 ni kalkulis pli ol 2.200 da leteroj. Ni prenis sisteme 2000 el ili kaj kalkulis, kiom da alskriboj venis el diversaj landoj. Jen ni prezentas al vi kelkajn ciferojn. Certe ili interesos vin.

Algerio	1	0:05 %
Anglujo	51	2:55 %
Aŭstrujo	94	4:70 %
Belgujo	30	1:50 %
Bulgarujo	3	0:15 %
Ĉeĥoslovakujo	470	23:50 %
Danlando	51	2:55 %
Danzig	2	0:10 %
Egipto	1	0:05 %
Estonio	14	0:70 %
Finnlando	2	0:10 %
Francujo	693	34:65 %
Germanujo	165	8:25 %
Hispanujo	13	0:65 %
Holando	42	2:10 %
Hungarujo	20	1:00 %
Italujo	125	6:25 %
Jugoslavio	43	2:15 %
Latvio	9	0:45 %
Litovujo	4	0:20 %
Manĝurio	1	0:05 %
Norvegujo	25	1:25 %
Pollando	32	1:60 %
Rumanujo	2	0:10 %
SSSR (Aŝhabad)	1	0:05 %
Svedujo	90	4:50 %
Svisujo	16	0:80 %
27 landoj	2.000	100:00 %

Ni dankas al ĉiuj niaj amikoj en la tuta mondo por ilia afabla kunhelpo en la internacia radio-propagando.

14. majo je 22:15 h parolis el stacio Moravská Ostrava O. Gadula pri „Ĉeĥoslovaka minekspluato“.

20. junio 22:35—23:35 h el ĉiuj ĉeĥoslovakaj stacioj esperantlingva horeto. Programo: Karel Čapek, Letero el Ĉeĥoslovakio. Bedřich Smetana, El la hejmo. Esperantaj aktualajoj. Radiofilmo „Ho, kie hejm?“

Lokaj informoj.

Berehovo. Finita kurso kun 33 p. Gvidis dro Evžen Róna el Výlok.

Ĉeský Těšín. 12. IV. nova kurso kun 30 p.

Hradec Králové. Ĝenerala kunveno 18. IV. Kurson en soc.-dem. Dělnický dům kun 25 p. gvidas St. Borovka.

Jablonec n. N. La grupo aliŝigis 34 grandajn aliŝojn de la Stockholma kongreso kun germanlingva teksto.

Jaroměř. Vigla vivo en la Esperantista klubo „Zamenhof“. Konkiza eltiro el la kvaronjara raporto prezentita 12. IV.: Ĝen. kunv. 18. I. La distrikta lerneja konsilantaro ne permesis la proponitan instruadon de esperanto en la urba lernejo knaba. Post bone farita propagando per gazetoj kaj leteroj al ĉiuj gravaj lokaj institucioj kurso komenciĝis en la klubejo 1. II. kun 15 p. kaj finiĝis 3. IV. kun 12 p. Instruis f-ino Scharlenbergerová. Pri novaĵoj el la movado informas du ŝildoj en la urbo. La lokaj kinoteatroj projekcias varbajn diapozitivojn. Lokaj gazetoj aperigis dum tiu periodo 52 artikolojn propagandajn. (Gazeta Servo de ĈAE estus tre danko per regula liverado de la eliranĉaĵoj.) Parolado de Mustafa Raden 16. III., kursfina festo 26. IV.

Kolín. La Esperantista klubo festos nunjare sian dekjaran daŭron. Ĝi aranĝos aŭtune en tago ankoraŭ difinita kunvenon de centro- kaj orientbohemiaj esperantistoj. Estas promesita partopreno de multaj gravaj laborantoj kaj la kunveno estos do bonvena renkontiĝo de ĉiuj aktivaj esperantistoj.

Lázně Bělohrad. 1.—2. IV. vizito de s-ro Heinze el Utrecht. 5. IV. malfermita kurso kun 20 p. gvidata de L. Mašínová.

Mnichovo Hradiště. 19. IV. Zamenhova vespero. Regiona konferenco 6. VI. vizitita el Bakov, Mladá Boleslav, Česká Lípa, Jablonec, Rychnov, Liberec kaj Turnov. Nia flago flirtanta sur la hotelo ĉe la stacidomo bone propagandis, ĉar samtempe estis nacia festo en la urbo. La konferencon malfermis s-ro Blažek. La instigaj diskutoj pri laboro farita kaj farota efikis bone sur ĉiujn partoprenantojn de la konferenco. Vizititaj estis la kastelo kaj la rokaro en „Bohema paradizo“.

Moravská Ostrava. 22. IV. ekskurso de EK., 24. IV. membra kunveno kun parolado pri dro Zamenhof, 1. V. aŭtobusa ekskurso al la majaj festoj en Zlín, 13. V. kaj 27. V. ekskursoj anstataŭ membraj kunvenoj, 10. VI. ekskurso aŭtobusa al Ĉantorio. Nova komitato de EK.: Prez. Karel Chrobák, vicprez. Vladimír Slaný, sekret. inĝ. Ladislav Krajc, kasisto Fr. Mazánek, protok. Otakar Gadula, bibl. Jarosl. Vichnar, aliaj komitatanoj: A. Martínková, H. Hrabovská, J. Sendžimir, Prorok, L. Novák, K. Majtner, Hařna, Spytkowski, J. Wojewoda, K. Kapek, Šrámek, J. Polek. Eldonata „Verda Informilo“, kluba bulteno multobligata.

Nové Zámky. Esperanta Rondo Amika informas. Post longa silento la movado revigliĝis. La estraro estis nove elektita kaj estas rimarkebla en la urbo nova interesiĝo pri nia lingvo. Per helpo de ERA estis aranĝita kurso en Parkan. Nia membro s-ro Jozefo Bečka kun sia amiko s-ro Fr. Meško ekiris 9. V. piede al la Stockholma mondkongreso. Sciigojn por ERA adresu al la sekretario J. Kotoulek, Nové Zámky, Výpališsko 13 II./20 II.

Nymburk. 21. IV. ĝen. kunv. Prez. E. Tyl, vicprez. R. Pavlíková, sekret. J. Buka.

Olomouc. Albín Neužil gvidis 2 kursojn: en unuagrada lernejo por 12 infanoj de la 5-a klaso, publikan por 23 p. en komerca akademio.

Pardubice. Ĝen. kunv. okazis 6. VI. en la konferenco de malnova reala lernejo. Nova komitato: prez. dro Fousek, advokato el Přelouč, vicprez. R. Veverková, sekret. A. Michalová kaj Vi. Šukal, kasist. M. Vondrová, bibliot. E. Kratochvílová, arĥiv. M. Hostýnková, kom. Z. Langer, K. Tušicová.

Parkan. La 24. IV. aranĝis L. Blecha propagandan paroladon, depost 26. IV. kurso kun 18 p. gvidita de J. Kotoulek, sekretario de ERA Nové Zámky. Fondita Esperantista rondo de fervojistoj kun 12 membroj kiel sekcio de ERA. Sendon de legitaj esperantaj gazetoj kaj libroj kaj de ĉiu propaganda materialo petas Lad. Blecha, Parkan 2, odbor pre udržovanie dráhy.

Plzeň. 1. IV. ĝen. kunv. de Laborista Ligo Esperantista. 14. IV. Zamenhova memorvespero de Laborista klubo. Samvespere parolis Pech pri sia vojaĝo al Afriko. 27. V. ekskurso al Lhotka-Dobřany.

Praha. Esperantista Klubo. 6. IV. Ph. Heinze el Utrecht (Nederlando) vizitis la Klubon, kie li aranĝis amuzan scenon. — 13. IV. Dua sekret. Lešák paroladis pri sonfilmo kaj filmado. Estis la unuan fojon, kiam tiu ĉi juna komitatano publike parolis. Li atingis rimarkindan sukceson kaj aplaudon de ĉiuj ĉeestantoj. Šustr parolis pri vizito de simpatia franca esperantisto s-o Dronchat el Parizo kaj pri okazonta konferenco en Vieno. Al M. Staněk estis transdonita premio (libro pri Aŭstralio), ĉar li disvendis plejmulte da enirbiletoj por parolado de Haĝi Mustafa Raden. — 20. IV. Programon de la kunveno plen-

igis prez. per informado pri div. aktualajoj. Oni ankaŭ kolektis librojn por Esp. klubo en Vodňany. — 27. IV. Vicprez. Fr. Staněk havis nekulime interesan paroladon pri arkitekturo. Li lerte skizis la historion de arkitekturo depost ĝia plej malnova komenco ĝis tempo moderna. Multajn siajn klarigojn li akompanis per instruaj bildoj. — 4. V. Amika kunsido. Pri kunveno kaj ekskurso al Mnichovo Hradiště kaj pri konferenco en Vieno parolas Šustr. — 11. V. Parolas gastoj el Estonio kaj Germanujo. Akceptita propono de kluba revizoro konsilanto Kocura aranĝi ekskurson al ĝardeno de Ledebour. — 16. V. Tria komitata kunveno. — 18. V. Staněk Fr. parolas pri interamikiĝo en la klubo. Debato. — 25. V. Instruisto de elementara kurso informas pri la rezulto kaj pri formiĝo de amuza sekcio el la kursanoj. Poste sekvis referatoj de klubestro pri Stockholma kongreso, pri diversaj novaĵoj, pri vortaro de Iŝiguro k. a. — 1. VI. Kunveno, kiun la unuan fojon ĉeestis ekslernintoj de la ĵus finita elementara kurso. Ili mem ankaŭ zorgis pri la programo. Prez. klarigis al nove venintaj avantaĝojn de kluba membreco. Sekvis enkonduko de vicklubestro, kursgvidanto Fr. Staněk, kaj poste gesamideanoj Lettl, Šanko, Turková, Vavrušová, Šuda kaj deklama kolektivo prezentis siajn salutojn, poemojn, recitaĵojn kaj aliajn aŭdindaĵojn. Fermis Staněk per virtuoza ludo sur mandolino. — Diamanĉe, la 3. VI. okazis la anoncita ekskurseto al ĝardeno de Ledebour, kiu estas unu el malplej konataj subkastelaj ĝardenoj en Praha. Partoprenis 16 personoj, gvidis kaj klarigojn donis konsilanto Kocura. Ĉeestintaj samideanoj estis agrable surprizitaj per ĥordonacetoj de s-o Kocura dum foriro el la ĝardeno. — 8. VI. paroladis unua sekret. Šinták pri interŝanĝado kaj interŝanĝaj kluboj. Interese estis aŭskulti, kiel homoj, ne konantaj esperanton, interkompreniĝetas per diversaj signoj kaj strangaj vortoj, kiuj ofte signifas frazojn. Tiuj homoj ne povas unu al alia diri, kion ili volus, ĉar ilia interkompreniĝebleco estas per kodo limigita. Tuta sistemo estas nenio alia ol granda ludo, kiu por nuna moderna epoko estas ne nur nesufiĉa, sed ridinda. — 26. IV. ĝen. kunv. de la *Ligo de katol. esperantistoj*. — 31. V. ekskurso de SOĈNE.

Prešov. 3. VI. fonda kunveno de Esp. Klubo.

Prostějov. Ĝen. kunv. 3. V. Prez. St. Jeřábek, vicprez. A. Malčec, sekret. Fr. Heikenwälder, kas. V. Kleiner, bibliot. A. Oszlý.

Svitavy. 20. V. prop. aranĝoj, ekspozicio kaj amuza vespero.

Turnov. Ekskurso de Esp. rondo al Mnichovo Hradiště. — 24. IV. Zamenhova vespero.

Uh. Hradiště. 28. V. kurslina festo. — 10. VI. Ekskurso al Filipov.

Veselí n. Mor. Kurslina festo. Fondita rondeto, prez. Kárník, sekret. J. Spárová.

Esperantista vivo.

H. K. Bouška ankaŭ jam vidis Abrahamon. Li naskiĝis la 2-an de marto 1884. El diversaj liaj laboroj estu tie ĉi rememorigata precipe lia ĝisfunda studo de la lingvaj problemoj de esperanto, kiu kaŭzis, ke li fariĝis aŭtoritato nia en prilingvaj demandoj. Multnombraj liaj artikoloj kaj artikoletoj tiutemaj estas ĝis nun fonto de tre fidinda instruo. Li redaktis 3—6-an jarkolekton de Český esperantista; li kreis en ĝi specon de propaganda revuo, kies formo kaj nivelo malofte estas atingataj eĉ nun. En j. 1920 li redaktis kaj plejparte sola verkis ĉiutage aperantan esperantlingvan kolonon en Prager Presse. Ankaŭ tiu laboro estis pionira, kiel pluraj laboroj de Bouška. Li fartu bone ankaŭ dum la dua kvindeko de siaj jaroj!

Eduard Růhl atingis 50-an jaron. Li naskiĝis la 16-an de majo 1884 en Praha. La meritplena pioniro de nia movado estu tie ĉi salutita de ni. Ni rememoru, ke li kun Fr. Bárth estas kunfondinto de la Esperantista Klubo en Praha, eldoninto de Ĉasopis českých esperantistů, aŭtoro de detala lernolibro kaj kunverkinto de la unua detala vortaro ĉeĥa-esperanta. Kun niaj salutoj ni ripetu al la iama vigla organizinto de la movado la peton, ke li denove ekpartoprenu aktive en nia organiza laboro.

Dr. Alexander Batěk sesdekjara. Ni uzu la okazon por esprimi niajn dankajn sentojn al tiu ĉi pioniro de raciisma, norma, optimisma vivaranĝo. Estas logike, ke li partoprenis aktive ankaŭ en la esperantisma movado. Li estis eĉ unua prezidanto de Bohema Asocio Esperantista. Kaj en tiu ĉi jaro li aperigis siajn „Neoglifojn“ ankaŭ en Esperanto.

Vicprezidanto de ĈAE dro Aug. Pitlik estis dekoraciita per oficira ordeno de la Franca Akademio. Sinceran gratulon!

Jan M. Bakalář-Srbecký, aŭtoro de unua ĉeĥlingva artikolo por lingvo internacia, ĝisvivis kiel pastro en pensio 25. V. 1934 la 50-an revenon de dato de sia unua meso.

Honorigo. Juraj Franček, komitatano de E-klubo en Bratislava, estis promociita je doktoro de juro 12. XII. 1933. Li akceptu nian sinceran gratulon!

Edziĝo. S-o Křetinski el Radvanice edziĝis 4. VII. 1934. La junaj geedzoj akceptu nian sinceran gratulon!

Edziĝo. Rudolf Waldstein kaj Valda Nassová, membroj de Esperantista klubo en Praha. Sinceran gratulon!

Naskiĝo. Al ges-roj Blažek en Mnichovo Hradiště naskiĝis la 24-an de aprilo filino Zdeňka. Gratulon!

Ricevitaj libroj.

BES-Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj, 11-a eld. 1934, enhavas pli ol 1000 adresojn (el ĈSR ĉ. 170), 100 portretojn de esperantistoj. Paĝ. 110, prezo 7'80 Kč. — Oni akceptas aliĝojn por la estonta eldono, kiu aperos printempe 1935: publikigo de la adresaro kun nova eldono kostas 7'80 Kč. Eldonas BES, Poštštein. Ricevebla ĉe Sekretariejo de ĈAE, Praha-Bubeneč 447.

V. Rákosi: For la viandon kaj 5 aliaj bonhumoraj rakontoj, tradukitaj el hungara de L. Spierer. Eld. A. Pražák, Jablunné n. Orł. Kč 5.—.

Katalogo de la Esperanto-gazetoj. Kompilis dro J. Takács. Enhavo: Listo de esp-aj gazetoj kaj de gazetoj kun konstanta e-fako, listo de gazetoj por aliaj mondlingvo-projektoj, listo de urboj kaj de landoj, kie aperis e-gazetoj, statistiko pri e-gazetoj. Kč 15.—. Ambaŭ verkoj riceveblaj per ĈAE-sekretariejo.

Lingva kvaronhoro. Lingvaj problemoj traktitaj kaj klarigitaj de P. Nylén. (En sveda lingvo.) Vicprez. de la Akademio donas al la svedaj studentoj de esperanto valorajn klarigojn pri plej diversaj problemoj de la lingvo.

Per kio ni amuzu nin. Societo- kaj dancludoj de J. Rosenberg kaj E. Malmgren. Utila libro por ĉiu klubgvidanto, kiu ŝatas vivigi la grupan vivon.

Ambaŭ supraj volumoj estas haveblaj po 1 sv. krono ĉe Eld. Soc. Esperanto, Poštšfako 698, Stockholm 1.

Absolutismo. Parolado de E. Lanti en la kongreso de la Federacio de la laboristaj esperantistoj en Antverpeno 1934. 16 pĝ. Prezo 1 Fl. Eld. SAT, 67, avenue Gambetta, Paris 20.

Tirol, nova faldprospekto 12-paĝa kun multaj bildoj kaj geogr. karto. Eldonis Landesverkehrsamt für Tirol und Innsbruck. Bona propagandilo por la Antaŭkongreso 1935 en Innsbruck.

La Pirato. Kajeroj por satiro, humoro kaj libereco — relativa. La plej amuza gazeto en Esperantujo, bonege redaktata. Unujara abono (12 numeroj) 20 Kč. Abonejo por Ĉeĥoslovakujo: ĈAE, poštšteka kto No 12.371 de „Svaz ĉs. esperantistů, Ústřední kancelář“, Praha.

La esperantistoj revis havi gazeton redaktatan de profesiaj ĵurnalistoj. Ilia revo efektiviĝis. Aperis *Nia Gazeto*, monata, la plej malkara, grandformata, ilustrita. Abonprezo 20 Kč. Abonejo por ĈSR.: ĈAE. Pagu al poštšteka kto 12.371 de „Svaz ĉs. esperantistů, Ústřední kancelář, Praha“.

Rozmluvy o radiu. El esperanta originalo de E. Aisberg tradukis en ligvon ĉeĥan O. Ginz. Por Kč 10'60 aŭ frankite liveras ĈAE. La libro, kiun la tutmonda kritiko deklaris la plej bona verko de tiu speco, klarigas en maniero al ĉiu komprenebla la

principojn de radio. Donacu al viaj amikoj kiel rimarkindan pruvon pri preteco de nia lingvo — la libro estis tradukita el esperanto en 13 lingvojn.

Novajo de Dickens en esperanto. Nur en 1934 represita verko de Charles Dickens „La vivo de Nia Sinjoro, Jezuo“ aperos nun en esperanta eldono lukse ekipita. Por 6½ ŝilingoj ĝin liveros Brita Esperantista Asocio, 142, High Holborn, London W. C. 1.

Informoj.

Gramofonaj diskoj esperantaj. ĈAE povas liveri gramofonan diskon kun nia himno „La Espero“, majstre kantita de la fama infana ĥoro Bakule, por 30 Kč aŭ frankite en bona pakaĵo. Sur alia flanko de la disko skolta himno ĉeĥa, germana kaj franca. Monon sendu per blankopagilo al poŝtĉeka kto nro 12.371 de „Svaz ĉs. esperantistů, Ústřední kancelář, Praha“. Novan diskon kun La Espero kaj La Tagiĝo ekspedas la Eldona Societo Esperanto, Stockholm, po sv. kr. 3:50 krom aŭfranko kaj dogano.

Ĉu vi deziras informi vian amikon pri esperanto? Sendu al ni lian adreson kaj 1 Kč poŝtmarkon. Ni ekspedos al li informan flugfolion kaj Ĉefeĉ-ŝlosilon. Li ekscios tiel ĉion gravan pri la movado kaj lingvo.

Se vi volas ĝojigi vian korespondanton, sendu al ni lian adreson kaj 1 Kč poŝtmarkon. Li ricevos de ni lukse eldonitan gvidfolion pri Praha.

Preparu vin por Kolín 30. IX. 1934! Esperantista kunveno de granda graveco. Partoprenos ankaŭ komitato de ĈAE. Preparu vin por partopreno! Detaloj sekvos.

Prelegoj de T. Morariu pri Romanujo. Estas ebleco aranĝi prelegvojaĝon de tiu ĉi eminenta oratoro sub similaj kondiĉoj kiel tiu de Raden. Interesantoj anoncu sin tuj ĉe sekretario J. Šustr en Praha I., Dlouhá 53.

ĈAE-kotizoj — UEA-kotizoj.

La enkasigo de kotizoj por nia Asocio estas tiun ĉi jaron tre kontentiga. La nombro de membroj jam superas tiun de la pasinta jaro. Tamen restas ankoraŭ multaj nerepagintoj.

Male tre nekontentiga estas ĝis nun la nombro de repagintaj MJ kaj MA de UEA. Ni bone komprenas la malfacilan ekonomian situacion de multaj samideanoj kaŭzitan de la samtempa krizo. Sed same ni bone scias, ke por multaj estas la malalta kotizo facile pagebla. *Tial ni petas aŭfable ĉiujn anojn de UEA kaj de ĈAE, kiuj ne repagis ankoraŭ, sendi koncernajn kotizojn al nia kasisto per poŝtsparkasa pagilo. Ni fiksis jam por 1934 la kotizojn kiel asocio*

aliginta sian membraron al UEA. Rezultas el tio ŝparo da 3 Kč por niaj anoj. Ni ripetas tie ĉi la sumojn de la kotizoj: Pagas po jare:

Membro simpla (M) Kč 16— ricevas rajtojn membrajn, legitimacion kaj Bultenon de ĈAE.

Membro kun Jarlibro (MJ) Kč 48— ricevas krom la supraj liveraĵoj la oficialan Jarlibron.

Membro-Abonanto (MA) Kč 63— ricevas krom la liveraĵoj de MJ ankoraŭ la monatan revuon „Esperanto“.

Membro-Subtenanto (MS) Kč 166— ricevas krom la liveraĵoj de MA ankoraŭ valoran libro-premion.

Por la anoj aliĝintaj korporacie pagas la lokaj grupoj sole 12 Kč anstataŭ la 16 Kč.

Ekzistas pluraj niaj membroj pagintaj por 1934 la 16 Kč kaj ne-repagintaj por UEA. Ili povas repagi por la Jarlibro sole 22 Kč, por la Jarlibro kaj „Esperanto“ sole 47 Kč. La samaj favorpreztoj validas ankaŭ por la korporaciaj membroj.

Por pago uzu poŝtsparkasan pagilon sisteme senditan. Se vi ne posedas ĝin, uzu la blanko-pagilon kaj surskribu la nomon de la konto „Teritoria oficejo en Hradec Králové“ kaj la numeron: 110.878 — Brno I

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis la unua volumo de la **Enciklopedio de Esperanto,**

kiu kun sia dua volumo, aperonta en la novembro ĉijare estas sendube ne sole malhavebla libro por ĉiu serioza esperantisto, sed ankaŭ ĝis nun la plej granda verko en la originala esperanto-literaturo. La unua volumo prezentas 300 bildojn kaj 1100 titoloj sur 272 tekstoj kaj 112 bildopaĝoj grandformataj. La dua volumo ampleksos proksimume 540 paĝojn.

La verkego okupiĝas pri la tuta movado, pri ĝia historio, propagandaj metodoj, literaturo, lingvo, organizo, laborantoj en ĝi, ĉio en maniero de sciencia enciklopedio.

Libro Servo de ĈAE povas liveri la verkon por Kč 206— broŝuritan eldonon, por Kč 233— binditan, aŭfrankite. La sumo estas pagebla en du partoj, al poŝtĉeka kto nro 12.371 „Svaz ĉs. esperantistů, Praha“.

Alvoko.

La Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj (AELA) sendis al kelkaj konataj samideanoj en nia lando sian unuan eldonaĵon, la brilan **Hungaran Antologion** por turni intereson al bona literaturo kaj por atentigi pri sia agado.

Pluraj amikoj komprenis la gravecon de la afero kaj aliĝis al AELA aŭ akiris almenaŭ la ricevitan verkon. Ili fariĝis tiel ŝatindaj subtenantoj de valora literaturo, kiun al la movado prezentas la unika organizaĵo de AELA.

Tamen restis kelkaj, kiuj ĝis nun nek pagis la libron nek resendis ĝin kaj al ili ni venas kun peto, ke ili faru sen plua prokrasto sian decidon. Ili aŭ pagu Kč 70— por la Hungara Antologio al la poŝtĉeka konto nro 94.796 (Otto Ginz, Praha) de nia ĝenerala sekretario, kiu administras tiun aferon aŭ resendu la libron al lia adreso: O. Ginz, Praha II, Stárkova 4. La koston de la ekspedo bonvolu samtempe anonci kaj ĝi estos tuj repagita.

